



Eldonas : Cercle espérantiste de * Abono por unu jaro : 18 FF
l'Agenais, F 47340 LAROQUE * (14 FF en Francio)
Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux * al la ĉi-apuda pök.

la kastelnova grupo



POSTKUNVENE



ESPERANTO - GRAMOJ

El gasteja vivo

Ankoraŭ kalikon, kalikon,
Kaj jam ni estas koramikoj!

Peto de kulo

Mi mordpikis pastron,
ege pian mastron,
De nun ĉiuj uloj
nomu min pi-kulo!

Militoj

La skandalo
de l'homaro.

Mia honorigo

Medalon de l'ano aktiva,
Mi ricevos; sed jam malviva.

Malsaĝa konstato

Se oni estas senvesta,
Malfacile esti honesta.

x x x

Jen mia demando Samideanoj :
Ĉu realiĝos niaj sloganoj ?

Pro stileraro

Juna samidean' al gepatra domo,
Sendis leteron el verdstela kongreso:
"...samideanoj jen ne normalaj homoj.."
Tiel li pruvis de l' ideo progreson.

Kiel pli bone ?

Jen konstato de l'samideano :
Estus bone, karaj estraranoj,
Ke, niaj famaj reprezentantoj
Iom sciu ankaŭ Esperanton.

Tiam venos aŭtuno

Nur tiam estos mi maljuna,
Se dum la krepusko lunluma,
Mia filo proponos: - Patro!
Iru kun panjo al teatro !

Kio estas amo ?

Amo? Laŭ eldiro de virkoko:
Jen reveno, al la naskiĝloko.

Ĉebalta Esperantista Printempo

Maj' maro, primavero,
Kis', am' - sign' de l'espero.

Scivolulino

Meznokte sur kanapveluro,
Ŝi demandis :
- Kun kiu mi havas plezuron?

Pri la paco

Karaj! Dia graco,
Ne certigos pacon!

Invito


Jen al diskutinvito :
Ĉu estas pac-militoj ?

En rondo familia

Ankaŭ niaj kuzoj
havas siajn ruzojn.

NIA DEBATO

LA VIRINA PROBLEMO



Laŭ mi, en tiuj ĉi jaroj ne okazis la feminisma revolucio. Ĉar multaj virinoj celas la egalecon inter la seksoj per simiado de la viroj (kompreneble, de la "fallokrataj" viroj, la samseksemuloj ne estas viroj), tial ankaŭ la feministinoj estas egale fallokrataj. Dum la nefeministinoj ne simias sed ja obeas la dion-viron.

La inistina virino nun volas fariĝi policistino, juĝistino, ktp. Krom en la laboro ankaŭ dum la konversacio. Ekzemple en Italio, "iŝi" diras penis, ne vagino. Mi demandas min : se la viroj ne fumus, ĉu iŝi fumus ?

En antikveco la nomatan matriarkan socion oni bazis sur la libera amo. Ne ekzistis la malsprita figuro de la Patro. La viro konsideris la infanojn kiel amikojn kaj ne sia propraĵo. En Italio antaŭ kelkaj jaroj iŝi diris : "La korpo estas mia kaj mi memmastrumadas ĝin." Nun iŝi pri la korpo volas proponi leĝojn.

La 8a de marto estas festo. Festo por kio ? Ha, mi forgesis : estas la florista festo. Antaŭ kelkaj jaroj en Belfasto - se mi ne eraras - okazis vere malfallokrata batalo. Du virinoj organizis la pacifistan movadon. Iŝi diris : vi viroj scias bone nur murdi. Ni virinoj diras ne al la armiloj, jes por senarmila kaj sen landlima socio. Tiuj virinoj skizis la sulkon por la malfallokrata socio.

Dum la aroganta sinjorino M. Thatcher kune kun la

Antoni Madej

reĝino faras paron. Ili estas la perforto, tial estas fallokrataj.

Alessandro Panerai.

Red.: Jen vira opinio pri virina problemo. Kompreneble, temas pri persona vidpunkto de leganto de "Laŭte!". Nun lokon (kiel eble plej vastan!) al la virinoj !

Suzana :

Dum jarcentoj, kie ajn en la mondo, la virino estis/ estas konsiderata kiel malestiminda subulo, eĉ malamata, pro malamo al la ineco.

Sufiĉas legi la verkaĉojn de Sade, Miller, Bataille, Lawrence! "Le serpent à plumes" de Lawrence, "La négresse muette" de Michel Bernard, "Histoire d'O", "Eden, Eden" de Pierre Guyotat, Tony Duvert. Ĉiuj naŭzas !!!

Evidente, ni konfesu : la homaro estas mizogina. La homoj estas mizoginaj kiel ili spiras, t.e. nature. Kun simila senkulpeco, simila pura konscienco. Kiam oni konsideras la Historion, la literaturon aŭ la filozofion, oni konstatas, ke la mizogineco estas tiel profunda, tiel intime miksitaj en ĉiuj agoj de nia vivo kaj en nia kulturo, tiel disvastigita kaj tiel... normala, finfine. Kaj plej ofte oni ĝin eĉ ne distingas. Tamen ĝi estas en preskaŭ ĉiuj religioj kaj ankoraŭ hodiaŭ pezas sur la agmanieroj de la plimultaj viroj kaj de granda nombro da virinoj.

Ĉar neniam, aŭ preskaŭ neniam, la privilegiuloj zorgis pri la animstatoj de tiuj, kiujn ili subigis, ĉu pro la denaska origino, ĉu pro la sekso, la haŭtkoloro. Ĉiam ili opiniis sin privilegiitaj de Dio, de la Providenco, aŭ de la Naturo. Pro tio, ili havis neniam skrupulon.

Multnombros la manieroj esti mizogino :

- Tiuj, kiuj kalkulas je virinoj por certigi la pluvivon de la familio, nome de la virina feliĉo...
- Tiuj, kiuj asertas, ke ili defendas ilin kontraŭ ili mem..(Red.: ja iŝin kontraŭ iŝi mem)...
- Tiuj, kiuj ilin respektigas kiel patrinoj, kio permesas al ili malestimu ilin kiel seksajn objektojn...
- Tiuj, al kiuj ili estas nepre necesaj...

- Tiuj, kiuj provas evitigi al ili "la detruantan laboron kaj la intermiksatecon en la fabrikoj"...
- Tiuj, kiuj senĉese sin apogas sur la laŭdiraj leĝoj de la Naturo, kiam temas pri virinoj...
- Tiuj, kiuj opinias ke, ĉar pli instinktaj, la virinoj estu perantoj inter la universo kaj ili...
- Tiuj, kiuj omaĝas nur al ilia beleco, komplementa de la vira inteligenteco...

...Ĉiuj ĉi estas mizoginoj kaj des pli danĝeraj, ke ili neas aŭ ne scias tion.

Malkaŝe malestimu la virinojn kiel Aristoto aŭ Sankta Paŭlo; aserti, ke ili estas malsuperaj pri inteligenteco, kiel Augusto Comte ; opinii, kiel J.J. Rousseau, Napoleono aŭ Nietzsche, ke sklaveco estas ilia natura stato... tiaj argumentoj nun fariĝis nedefendebaj. Restas nur iuj verkistoj, inter ili verkistinoj E. Vilar ("Le Sexe polygame"), Marabel Morgan ("La Femme totale"), kiuj provas montri, ke ili estas tiel mizoginaj kiel la viroj, kaj amuziĝas facile distrante la legantaron.

* *

"La submetigo de sekso al la alia estas malbona kaj estas unu el la ĉefaj obstakloj sur la vojo al progreso de la Homaro" (John Stuart Mill, 19a jc.).

Jean-Jacques Rousseau, kiu restis kristano, opiniis la virinon, same kiel la ekleziularo, "pereiga ilo de la homgenro".

Ja oni skribus volumojn, nur konigante tiajn citaĵojn, sed mi ne volas tedi la legantojn, precize la legantojn, kaj la redaktanto ne permesus tion (*), kvankam ne multnombraj viroj (kaj virinoj) en la pasintaj jarcentoj provis atentigi siajn samtempojn pri tia submetigo. La virinoj konu la nomojn de tiaj viroj : Condorcet, Blanqui, Fourier, Hippolyte Carnot, Victor Duruy, Albert de Mun, Paul Bert, Camille Sée kaj kelkaj aliaj .

(*)N.d.l.red. : La red. malpermesas nenion, sed, kiam tro abundas la materialo, prefere donas lokon al personaj opinioj de legant(in)oj, ol al tekstoj aŭ citaĵoj tre ofte mistradukitaj kaj kiujn oni povas facile legi en korekta nacia lingvo.

Victor Hugo skribis al unu el tiuj bonkoraj animoj, Léon Richer : "Estas dolore tion diri, en nia civiliza-cio estas sklavino. Eufemisme la Leĝo nomas ŝin neplen-aĝulo ! Tiu neplen-aĝulo, laŭ la Leĝo, tiu sklavino, laŭ la realo, estas la virino."

La Termidora Konvencio ordonis al la virinoj resti en siaj hejmoj kaj minacis aresti ĉiujn, kiuj kunvenos pli ol kvinope. Bedaŭrinde, Rousseau estis la plej aŭskultita kaj Napoleono "perfektigis" lian vidpunkton. Estis logike, ke, denove stariginte la sklavecon por la Nigruloj, li starigis ĝin por la virino en la hejmo.

Eĉ sinceraj revoluciuloj juĝis la inan kondiĉaron kiel ne gravan, eĉ nenecesan. Ŝanĝi la socion, jes ! Sed ne la edziĝon ! Forigi la privilegiojn, konsentite, sed ne tiujn de la viroj. Estas konstanteco en nia historio, kies ekzemplojn multajn oni konstatas ankoraŭ hodiaŭ.

Defendi la virinon pro la infano, tio ne estas feminismo, defendi ŝin en la nomo de la amoro, ankaŭ ne. Multaj viroj, kiuj asertis esti fervoraj defendantoj de la virino, nur aranĝis, pro trudo de eventoj, situacion, kiu tute konvenis al ili, kaj - pli grava fakto - kies skandalan aspekton ili ne vidis.

Nun la virinoj batalas por sia memstareco, por ke oni konsideru ilin liberaj estuloj. La sendependeco de la virino estas nepra !

* *
*

Mi memoras respondojn de junaj intervjuitaj dancorkes-tranoj pri la "ideala virino". Ĉiuj respondoj temis nur pri la "objekto". Eĉ, iuj el ili deziris, ke ŝi estu stulta ; eĉ beleco estis tute ne grava. Kelkaj aldonis rimarkigojn pri ia de ili ŝatata korpoparto. Sed neniam rimarkigo pri virino kiel sentema, pensokapabla estulo ! Kiajn aĉegajn diresprimojn ili uzis parolante pri inaj logaĵoj ! Nuntempe la Sad-anoj multiĝas !!

En la pasinteco verkistoj en operoj, kanzonistoj mal-estime priskribis la virinon. Ekzemple : "Rigoletto" : "kiel plumo alvente, virino malkonstanta". Tiel oni plu

vivigas tiun vidmanieron. Estas rimarkinde, ke en ĉiuj vortaroj la aĉajn sencojn de vortoj oni atribuas al la virino. "Plena Vortaro" kaj "Kiel Diri" pluigas tiujn diresprimojn. Ni, esperantistoj, estas progresemaĵoj homoj, do, laŭ mi, estus bone forigi tiajn esprimojn, kiuj ne plu ekzistu en humana homsocio.

Kiam virino estas kvardek kvin-kvindek-jara, tiam la gefiloj forlasis la domon (familion). La trudataj familiaj zorgoj estas iomete malpli pezaj. Ŝi angoras pri la kvardekjar-pluvivo. Ĉar la familiaj zorgoj forrabis ŝian tutan tempon, ŝi ne havis la eblecon kulturi sian personecon, nura maniero fronti kontraŭ la egoismo de la ĉirkaŭantaro. Plie, ŝi suferas la virokratan indife-renton.

Tia agmaniero kontraŭ la virinoj fontas el la invento de la "prapeko" fare de la Eklezio, celanta pluigi la virinan servutecon. De tiam, kulpas nur la virino pri ĉiuj suferoj, kiuj trafas la homaron. En la pasinteco la generadon kaj la inajn seksajn faktojn oni emis konsideri kiel diablaĵojn, danĝerajn faktojn. Ankoraŭ kelkaj pluigas tian stultaĵon : dum kelkaj tagoj ĉiumonate virino ne tuŝu plantojn, ĉar tiuj ĉi velkus, eĉ la vian-do putrus ! Kompreneble, nur la inaj elfluaĵoj estas malpuraj ! Same kiel, laŭ la reklamistoj, nur la virino je la 17a horo ĝenas la nazon de sia kunlaboranto, ktp. Sed jen pli serioza fakto : antaŭ 47 jaroj en Bretonio akuŝintino rajtis reiri en la preĝejon kun la aliaj pi-uloj, nur aŭskultinte "postakuŝan meson", celantan purigi ŝin pro la hontinda akuŝado !!!

De jarcentoj la Eklezio, la Scienco, la Moralo tute interkonsentis por senbrue ekde la naskiĝo nin senkapigi.

Alia fonto : la knabo, poste viriĝanta knabo, sin persvadas, ke lia sekso estas la plej grava. Kia stult-aĵo ! Unue, fieri pri la seksorganoj. Due, kompari ilin. Benoîte Groult en sia libro "Ainsi soit-elle" bonege kaj ĝuste klarigas tion. Tiu komparo evidentigas, ke la plej kompleta kaj grava estas la insekso.

* *
*

Kiam virino serĉas laboron, la malfacilaĵoj estas pli multnombraj ol por la viro kaj, ofte, la eventualaj dungistoj proponas postulajn kondiĉojn, kiuj ne temas pri la laboro. Ĉio en la homa socio fariĝas pli malfacila ol por la viro.

Fakte, la virino ĵus nun povas ekcirkuli en relativa trankvileco, eĉ vespere vojaĝi; sed ŝi suferas latentan maltrankvilecon. Ĉu vira menso povas kompreni en kia grado ĝi estas trudado, malhelpo? Ĝi fuŝas spektaklon, vojaĝon, ktp. Nuntempe, multaj junuloj petveturas; sed malriskema junulino ne povas tiel vojaĝi... Do, ne havante monon, ŝi restas hejme. Ĉiam en la homsocio la virino estu singarda. Antaŭ ol ŝanĝi la homsociajn strukturojn, oni ŝanĝu la estulojn, t.e. la vidmanieron.

El "Voĉo de virino" de Annie Leclerc: "Sen la virinoj kaj la vekigo de ilia senvalorigata konscienco, la veraj revolucioj fiaskos... (...) Ili (la virinoj) estos la kerno de la venonta, vera revolucio, alivorte: la lumo, la varmo kaj la vivo proklamita."

Ni ne forgesu niajn fratinojn, kiuj suferas kruelegajn agojn, nome torturojn pro sia ineco. Ĉu vi scias, ke nuntempe en Jemeno, Saŭd-Arabio, Etiopio, Sudano, knabinoj suferas la klitorotomion? Eĉ en Gvineo, Irako, Jordanio, Sirio, Ebura Bordo, ĉe la Dogonoj de Nigerio, kaj devige en multaj afrikaj triboj.

Ĉu vi scias, ke pluraj popoloj, en Sudano, Somalio, Nubio, Etiopio, Ĝibutio kaj en Nigra Afriko, aldonas al tia kruela vundo plej kruelan torturon, celante maloblighi kelkatempe la seksrilatojn?

Ĉiam pro la sama kialo: "vira supereco", malamo pri la ineco, ina subjugigo, sento de "proprietulo". En Nord-Birmanio, la "ĝirafa virino". Kia kruelaĵo! Kvinjara knabineto eksuferas tion. Se la viro decidas segi la kolringojn, tiam la kliniganta kapo paralizas la kvar membrojn, tiu paralizo ne estas rebonigebla... La Nigrulinoj kun pleto ĉe la lipo!

De sia seksmatureco, en Alĝerio ŝi restu ĉiam hejme ĝis sia maljuneco. Eĉ, kelkfoje, la virino atendu la noktigon por uzi la necesejon, kiu situas ekster la domo!

Eble iuj memoras la aferon Maschino. Ĉu ĉar temas pri "privata afero", ĉu ĉar eta kontraŭstaro provokis ribelon de la tieaj viroj (kiel rebaton anglianoj suferis la klitoroforigon), en UNESKO oni ŝajnis ne scii tion; la esploristoj, la etnologoj, la grandaj ĵurnalinformistoj ŝajnis, ke temas pri pitoreska religia tradicio, kaj diskrete priskribas la inic-ceremoniojn por la junulinoj. "Unu el la plej aĉaj malnoblaĵoj, kiujn naskis la homa spirito" (D-ro G. Zwang, aŭtoro de "La fonction érotique" kaj "Le Sexe de la Femme").

Kiel konkludo, tiu de B. Groult: "Longatempe oni rigardis la viran parolon kiel universalan veron kaj la plej alta inteligenta esprimo, same kiel la vira organo estas la plej nobla esprimo de la sekseco. Hodiaŭ la virinoj krii, kaj la aliaj virinoj - kaj la viroj - havu la emon aŭdi tian krion, kiu ne estas malamega krio, apenaŭ kolera krio, ĉar tiam ĝi sin turnus kontraŭ ili, la virinoj. Sed krio pri vivo. Fine, ni resaniĝu esti virino. Ne pro ni naskiĝis ino; sed ĉar ni ricevis inan edukadon, en vira socio travivis ĉiun ŝtupon, ĉiun agon en nia vivo, tra la viraj rigardoj kaj la viraj kriterioj. Ne per pluaŝkultado de tio, kion ili diras en nia nomo, aŭ por nia bono, ni resaniĝos."

Suzana.

Ĵansebo: Mi ne havas multon por diri pri la "virina ***** problemo". Tiu esprimo ĝenas min, ĉar ne ĉiuj virinoj havas la samajn problemojn kaj eĉ viroj havas problemojn, foje la samajn kiel la virinoj.

Laŭ tio, ke virino estas bela, malbela, juna, maljuna, riĉa, malriĉa, loĝas en moderna aŭ mezepoka lando, estas tute malsama afero.

Kial do meti homojn en kategoriojn? Kompreneble, estas pli efike por sin defendi. Mi bedaŭras, ke oni bezonas aparteni al kategorio por esti defendata. Ĉu ĉiu homo, eĉ la plej margena, ne rajtas al feliĉo?

Pliaj opinioj pri tiu temo aperos en la venonta numero de "Laŭte!". Legantinoj, vi havas jam enkondukon. "Laŭte!" estu via tribuno!

Pri "Ĉu mita proleta revolucio, ktp..."

Tiu demando reaktualigas la malnovan problemon, kies solvado konsistigas, laŭ mi, la unuan ŝtupon al tutmonda nova sociordigado, t.e. la reiron al la dekomencaj naturraj rilatoj inter la du neforigeblaj elementoj de la homa socio : la individuo kaj la kolektivo, kaj tiun pri la difinado de ties reciprokaj rajtoj kaj devoj. Ĉiuj provo de vivo en komunumoj nur montras la deziron reveni al tiuj naturaj rilatoj, sed, ĉar influataj de la falsita medio, ili devige koruptiĝas kaj estas destinataj fariĝi similaj al tiu medio kaj fiaski. Ĉar la kolektivo sen la individua bonvolemo povas nenion. Ĝi estas nenio ; ovo ne fekundigita, kaj, sen la spermatozoa sinifero, ĝi tute ne kapablas multobliĝi, diseriĝi kaj disvastiĝi. Pro tio, se la kolektivo rajtas diri al la individuo : "Sen mi vi povas nenion!" samrajtas la individuo respondi al la kolektivo : "Sen mi vi estas nenio!". Kaj en tiu spita stato ambaŭ daŭre stagnas ĉe "protozoa" skalo kaj ne kapablas ĝin transpasi. Por ke iu ovo fariĝu homa korpo, por ke iu kolektivo fariĝu tuthomara sociordo, nepre necesas, ke tiuj ovo aŭ kolektivo fariĝu konformaj al la deziroj de la spermatozoo aŭ de la individuo, kiuj kapablos fermentigi ilin. Ankaŭ nepre necesas, ke ĉiuj kolektiveroj ilin konsistigantaj, konsciiĝu pri tiu neevitebla konformiĝo. Konsekvence, ĉiu provo de soci-evoluigado nepre dependas de la individua membonvolemo, kiu mem dependas de la individuaj memkonsciiĝo kaj deziroj : oni ne metu novan vinon en malnovajn faskojn. Kaj nepre necesas, kiel iam diris la filozofo Etienne Gilson : "Pensi la veran por la Homaro, kiu baraktadas sub la devigado, kiun trudas al ĝi la akceptado mem de la vera". Misio unuavide malfacile plenumbla. Ĉu utopi-aĵo ? Eble! Sed mi ĉerpas en la respondo de Nicole tiun frazon : "...ĉar ĉiu homo rajtas dece vivi, sendepende de sia produktiveco". Ĉu tiu simpla frazo ne montras, ke homoj jam atingis al pli alta ŝtupo de socia konsciiĝo, kie oni ekkonceptas, ke la homoj nepre necese devas manĝi, kvankam nelaborantaj ?

Oni ja rajtus mokridi pri tiu evidentaĵo, sed konstatende, ĝi ne aspektas tiel evidenta al la kapitalistoj tutmondaj, kiuj helpe de la malnova slogano : "Kiu ne laboras, tiu ne manĝas!" (kies fiaplikado estas tiel trafe reliefigita de Petro Dikszejn en sia libro "Inter la Sovetaj Popoloj"), tiel alegre malsatigas milionojn da senlaboruloj, kaj tiel pelas ilin al ribelado, al ŝtelado, al mortigado, al revoluciado, al terorismo kaj al militado.

Ĉu tia rabista sociordaĉo ne pravigas la provojn reiri al naturaj socireguloj, kiuj instruas, ke la kolektivo naskinta la individuon devas zorgi pri ĝiaj nutrado kaj flegado, kaj ke, reciproke, la individuo devas helpi la kolektivon per sia laboro kaj ĉiuj siaj denaskaj kapabloj?

Do, male al la falsa koncepto nuntempe ĝenerale kaj oficiale agnoskata kaj aplikata, laboro ne estas civitana rajto sed individua devo, kaj estas devo de la kolektivo provizi per laboro ĉiujn individuojn ĝin konsistigantajn. Aliel agante, ĝi sin mortigas mem. Tiel okazas hodiaŭ.

Tial la individuoj serĉas aliajn kolektivajn vivmanierojn, kaj tial mi dankas al Nicole pro ŝia aserto, kiun mi senrezerve aprobas.

B.G.D.

Reuzita papero

Mi miras, legante la artikolon de K-do Vito (Laŭte 34). Certe mi estas ekologiisto kaj tial opiniis, ke reuzita papero estas bona afero, sed mi tamen pretas kredi kontraŭan informon, se ĝi estas konvinkiga.

Vito skribis "laŭ T.K., eldonisto de "Monato"...ktp.

Mi verŝajne ne konas la revuon MONATO, sed ne opinias, ke ĝi estas faka revuo kaj ke ĝi donas iun kompetenton al T.K., alie mi scias neniom pri T.K.

Mi bonvolas kredi, ke reuzita papero estas danĝero, sed Vito prezentas lian aserton, kvazaŭ ĝi estus evangelia vorto, kvankam ĝi donas pri tio nenian pruvon, eĉ ne seriozajn detalojn.

Se la legantoj de "Laŭte!" pensas neserioze, ili verŝajne konvinkiĝos pri la danĝero de reuzita papero kaj konvinkos multajn aliajn, kvankam nenio estas pruvita. Pli serioze estus malfermi en "Laŭte!" debaton pri "Reuzita papero, ĉu bono aŭ malbono ?"

L.A.

Letero de nova leganto :

"...La temo pri racio speciale trafis min. Mi pensas, ke racio estas serĉo aŭ klopodo al efikeco. Racio estas helpo al sukceso, des pli necesa, kiam oni ne havas multe da forto kaj mono ! Tial Internacia Lingvo devas esti racia, ĉar ĝi ne ricevas la forton nek la monon de ŝtato.

La moderna kalkul-sistemo, inventita en Hindio, disvastiĝis en Arabion kaj la tutan mondon, ĉar ĝi estiĝis pli racia ol la romana kaj aliaj antikvaj... sen la perforto de milito. Same la metra mezur-sistemo disvastiĝis en la mondon, ĉar ĝi estas pli racia ol aliaj sistemoj.

La demando estas : ĉu Esperanto estas sufiĉe racia por sukcesi? La respondo estas bedaŭrinde : ne. Ekzemple pri mezuroj la fundamenta Esperanto enhavas iom da metraj unuoj kaj multe da kompleksaj tute ne raciaj! Mi ne parolas pri la supersignoj de la alfabeto, kiuj estas malraciaj pro la kromkostoj de presado en Esperanto kaj neebleco uzi multajn modernajn tajpilojn. Dum Esperanto ne adoptos la internacian mezur-sistemon ekskluzive kaj ne permesos la uzon de sensupersigna alfabeto, ĝi ne estos vere racia lingvo kaj mensogoj pri perfekteco kaj racieco ne anstataŭas la favoran efikon de vera racieco. Pensu, ke en Usono skribiloj kun cirkumfleksoj estas importataj el Kanado kaj kostas duoble da mono, ke Heroldo pagis 60 000 pesetojn por aĉeti supersignojn, ke neniu en la mondo scias kiom estas loĉo aŭ hubo, fundamentaj Esperantaj mezurunuoj! Evoluo estas ne nur akcepto de novaj vortoj, estas ankaŭ arkaismigo de malraciaj formoj kaj vortoj.

Ampleksa ŝanĝo de la lingvo kiel deziras iuj ne estas racia afero : uzo de y kiel nova vokalo, ekzemple, komplikus la lingvon, dum se oni uzus ĝin por anstataŭigi ĝ en kazo de neceso (komputilo, vortludo, usona skribmaŝino, ktp) estus racia progreso; same la uzo de x por ĉ kaj q por ĝ... Rimarkinde estas, ke la fundamenta uzo de h anstataŭ la supersigno estas tiom malracia, ke neniu uzas ĝin !".

Pierre Meunier-Guttin

Tra Eŭropo per fervojo
kaj Esperanto (daŭrigo)

Socialismaj Germanioj

Historia rememoro :

- de 1933 ĝis 1945 regis la Trian Germanian Imperion la nacia-socialista germana laborista partio (NSDAP) ;
- de 1949 ĝis hodiaŭ regas la Germanan Demokratian Respublikon la socialista unuiginta partio de Germanio (SED), alianco kun aliaj partioj ;
- nuntempe (julio 1980) regas la Federacian Respublikon Germanan la socialista partio de Germanio (SPD), alianco kun alia partio.

Do, malgraŭ interrompo en la okcidenta parto, Germanio estis regata socialisme de 1933 ĝis hodiaŭ (julio 1980). Amen !

En Frankfurt (ĉe Odro, noto por okcidentanoj), mi diris al la policisto en bona germana lingvo : "Mi deziras transitvizon al Francio", kaj rezolute donis al li 12 francajn frankojn. Li ne protestis kaj stampadis.

La trajno alvenis je la 6a horo matene en la orienta stacidomo de Berlino, ĉefurbo de Demokrata Prusio ; ĉar mi jam vojaĝis en Berlino, mi sciis, ke mia bileto validas ĝis Berlino Okcidenta, tial mi atendis. Mi ja vidis, ke ĉiuj aliaj de mia kupeo foriris, sed ĉiuj estis poloj, tial mi opiniis normale, ke ili restu en GDR. Subite alvenis pruso en uniformo de fervojisto, kiu blekis al mi, ke mi foriru el la trajno. Post du semajnoj ĉe nekomprenoble parolantaj slavo, kaj post unu sendorma nokto en internacia trajno, kiom dolĉe estas reaŭdi lingvon de si konatan ! Mi diris al la pruso, ke mi ne kulpas, ke ion mi ne komprenis, ĉar la poloj diris ĉion pole, kaj mi estas kompatinda francino, kiu volas iri al Berlino Okcidenta, tial li bitte schön diru al mi malrapide, kion mi faru. Aŭdante, ke mi ne estas polino, ke mi eĉ estas sufiĉe civilizita francino por paroli germane, la pruso pli-

mildiĝis, portis mian valizon ĝis la kajo, kaj montris al mi trajnon kun la ŝildo "Aachen".

Do mi metis manon sur la malfermilon de la trajno al Federacia Germanio. Tuj juna pruso en uniformo de popola polico blekis, ke mi haltu. Mi diris, ke mi estas francino kaj volas iri al Berlino Okcidenta. Li respondis, ke tio eblas. Mi pensis, sed ne diris, ke tio ne nur eblas, sed certas, ĉar krom skizofreniulinoj, neniu GDRa civitanino aŭdacus tion aserti. Li aldonis: "Sed en tiu ĉi lando oni ne vojaĝas, kiel oni volas". Mi pensis, sed ne diris: "Tion mi jam rimarkis". Mi demandis, kion mi faru. Li atendigis min kune kun du poloj, kaj poste alvenis du vagonoj. Kiam ili estis alkroĉitaj al la trajno, la policisto permesis al mi eniri en ilin. Ĉar mi estis tre nervoza, mi diris: "Nun mi komprenas, ke la poloj havas popolan respublikon, kaj la germanoj Reichsbahn". Mi ne scias, ĉu tion aŭdis la policisto. Reichsbahn estas la ankoraŭ nuna nomo de la ŝtata fervojo de GDR. Bahn signifas fervojon en germana lingvo.

La trajno haltis en Friedrichstrasse, alia stacidomo de Berlino, ĉefurbo de Demokrata Prusio. Poste, la kontrolo estis sufiĉe rapida, kompreneble: por eniri en tiun trajnon en stacidomo Friedrichstrasse, unue oni devas esti kontrolata por alveni al la kajo, due oni devas atendi, ĝis policistoj kaj hundoj finas kontroli la trajnon. Kiam la trajno alvenis en Berlino Okcidenta, ne estis kajo apud mia vagono, ĉar mi estis fine de longa trajno. Mi tute ne miris: iam mi eniris en Friedrichstrasse en trajnon al Karlsruhe, kaj ankaŭ tiam mi rajtis eniri nur en la vagonon, kiun montris popola policisto. Mi ne atentis, ke tiu vagono ne iras al Karlsruhe, sed, atinginte Federacian Germanion, haltas en ĉiuj stacidomoj. Mi ne ŝanĝis la vagonon, mi dormetis, kaj meze de la nokto, meze de Germanio, miaj najbaroj diris al mi, ke mi ne plu estas en la ĝusta trajno. Mi eliris en sufiĉe granda urbo, kaj serĉis, ĉu estas trajno al Karlsruhe. Ĝojinde (por mi), dum tiu tempo la vagonoj de Berlino al Karlsruhe havis malfacilaĵon, tial ili atingis tiun stacidomon kun pluraj horoj da malfruo, kaj finfine mi povis reeniri en la saman trajnon por atingi Karlsruhe. Tial la aventureto, ke mi devis porti

la valizon tra tri vagonoj antaŭ ol mi povis eliri al kajo, povis min neniel surprizi.

Alveninte en Berlino Okcidenta, pola kunvojaĝinto min demandis, ĉu mi iras al Francio, sed mi diris, ke ne, ke mi volas trapasi unu tagon, unu nuran tagon, en Berlino Orienta, sed ke la formalajoj estas tiaj, ke mi devas unue iri al Berlino Okcidenta, kaj revenante peti vizon por unu tago. Li ne miris, verŝajne la simplecon de prusaj moroj li mem spertis en aliaj cirkonstancoj. Mi metis en la valizon ĉion, kion mi ne nepre bezonis en GDR, kaj lasis ĝin en fako de la stacidomo de Berlino Okcidenta. Poste mi iris rezervi kuŝlokon inter Berlino kaj Frankfurt-ĉe-Main.

Ĉar mi soifis, mi iris al unu el la trinkejoj de la stacidomo kaj petis unu glason da lakto. La tunizia kelnero respondis, ke estas abunda germana matenmanĝo, kun multaj manĝaĵoj, sed ke ne estas unu glaso da lakto. Mi diris: "Ke la poloj ne havas viandon, tion iu jam estis dirinta al mi, sed ke la germanoj ne havas lakton, tion mi ĉi-matene ekaŭdas", kaj foriris.

Mi iris per la okcidenta subtera trajno al Friedrichstrasse por tie ricevi vizon por unu tago en Berlino, ĉefurbo de Demokrata Prusio, kiel rajtas ĉiu posedanto de franca pasporto alvenanta el Berlino Okcidenta.

Longa kaj diversnacia estis la vico de la atendantoj. Kiam venis mia vico, mi demandis en germana lingvo, kiom kostas la vizo por unu tago en Berlino, la policisto respondis: "5 markojn". Do mi donis al li 12 francajn frankojn kaj demandis, kiom kostas en francaj frankoj la minimuma monŝanĝo. Doganistino respondis, ke frankoj estas akceptataj nur, se la alilandano ne havas okcidentajn markojn. Mi diris: "Kiam ion oni rajtas, tion oni ja rajtas, ĉu ne?" La policisto grumblis, sed mi pasis. Tion mi faris, ĉar mi rimarkis, ke la kurzo de la franca franko en Berlino Orienta estas honesta.

Oni donis al mi vizon, sur kies dorso estis skribita la kompleta listo de la stacioj de la subtera trajno, kien mi rajtas iri. Tion mi ankoraŭ ne vidis. Sed mi bone sciis, ke pro la multegaj vizoj de mia pasporto, kaj pro miaj iamaj studoj ĉe GDR-a universitato, mi neniel povus kredigi al la polico, ke mi povis nesciante forlasi Berlinon. Mi antaŭvidis, ke la amikino ne venos, sed sciis, ke estus multe tro

riska veturi ĝis ŝia iama loĝloko.

Mi iris al la orienta subtera fervojo. Pasante en la stacidomo, mi ne vidis la barbulajn ikonojn, kiuj kutime tie pendas, ili estis anstataŭitaj per fotoj de armiloj. Ĉar mi ne komprenis la polan radion, mi ne sciis, ke la ruĝa armeo estas en Afganio. Mi ne havis la ideon eliri por legi lasloganojn. En la koridoroj de la subtera trajno estis multaj afiŝoj pri solidariĝo al Vjetnamio (mi memorigas, ke dum 10 tagoj en Polio mi vidis unu sloganon sur strato, cetero tre diskretan).

Ĉar restis multe da tempo antaŭ la tagmezo, mi eliris al Aleksandroplaco. Rapide mi ekvidis la skribon: "laktotrinkejo". Do mi ne plu soifante iris, kaj rigardis la karton, kie estis menciite, ke la glaso da lakto kostas 29 pfenigojn. Mi mendis unu glason da lakto. Kelnerino demandis: "Ĉu nur unu glason da lakto vi deziras?". Mi diris jes, ricevis la glason, kaj kompreneble pagis 30 pfenigojn (ankaŭ en Strasburgo unu litro da senkrema lakto tre teorie kostas 2,29 FF); Mi eksidis apud du junuloj kaj diris al ili: "Imagu, tio ne ekzistas en Berlino Okcidenta". Ili silentis. Post 5 minutoj, mi klarigis: "Mi venas de Berlino Okcidenta, tie mi petis unu glason da lakto, kaj ĝin ne ricevis". Ili silentis. Post 5 minutoj, unu el la junuloj demandis, ĉu mi konas la alian junulon ĉe la tablo. Lin mi ne konis, do mi diris ne. Li demandis, ĉu plaĉas al mi la lakto, mi diris jes. Se mi estus malpli laca, mi dirus: "Jes, tie ĉi plaĉas al mi la lakto", sed al tiu respondo mi ne pensis, ĉar mi estis tute dormema. Li demandis: "Kaj ĝi alvenas rapide, ĉu ne?". Mi diris "jes fakte", kaj foriris.

Mi iris al poŝtejo por rigardi en telefonlibro, ĉu eble mi povas trovi novan adreson de mia amikino. Iu civile vestita demandis min: "Ĉu vi havas la telefonlibron de Berlino?" "Ne, diris mi senpripense, mi havas tiun de Potsdam". "Vere, li demandis min, ĉu vi ne havas tiun de Berlino?" Mi vigle respondis: "Mi ĵus diris, ke tiun de Potsdam mi havas, serĉu mem!". Mi estis iom nervoza pro dormomanko, kaj tiam kredis, ke li estas berlinano, kiu volas telefoni....

(daŭrigota!) Jakelino.

Lawrence Mee :

L A S T E L O,
monunuo de la Esperantistoj.

En la jaro 1946, Esperantistoj amase unuiĝis per internacia asocio por malebligi novan mondmiliton per kreo de nova socia ordo en la mondo, kaj tiu unuiĝo adoptis la sloganon, "Unu Mondo; Unu Lingvo; Unu Mono". La lingvo, kompreneble, estas la internacia lingvo konata al ni ĉiuj; la mono ricevis la nomon, la Stelo. Oni celis tiel disvastiĝi la uzon de tiu mono, inter Esperantistoj, ke ĝi poste povus preni gravan rolon en la mondo. Dum jaroj la uzo de la Stelo furoris. Bedaŭrinde, la fortoj disponeblaj al la organizgvidantoj ne sufiĉis por vere regi la evoluantajn paŝojn pri la Stelo, kaj iom post iom la monunuo perdis atenton.

Ĉiam, tamen, restis tiuj fideluloj, kiuj ankoraŭ volis, ke la Stelo regajnu sian renomon. Dum la frua somero de 1978, oni donis al la Stelo novan kvaliton, prenante la decidon, ke ekde tiam la "valor" de la Stelo restu stabila, ne tuŝita de inflacio.

Ni ĉiuj konas la minacon de inflacio. Varo, kiu kostis 10 unuojn de nacia mono antaŭ nur kvin jaroj, kostas nun 17 unuojn aŭ eĉ pli. Monata salajro de mil unuoj havas nur la saman aĉetpovon, kiel havis sescent kvindek unuoj antaŭ nur mallonga tempo. Ĉu efektive eblas teni stabila la valoron de iu monunuo? Kompreneble, oni devas fari ion pli komplikan ol simple preni la decidon, ke ekde iu dato la Stelo tenu sian valoron malgraŭ la atenco de inflacio.

La solvo kuŝas parte en tio ĉi, ke la eblecoj efektive fari aĉetojn per pagiloj esprimitaj en Steloj estas tre maloftaj. Sekvas, ke la normalaj kaŭzoj de perdo de valoro apenaŭ tuŝas la Stelon. Sed la Stelo estas, laŭ difino, ligita kun unu el la konataj naciaj monunuoj, la nederlanda guldeno. La guldeno certe estas influita per inflacio, kaj do por konservi stabilan valoron por la Stelo, la rilato inter la Stelo kaj la guldeno devas grade ŝanĝiĝi. Bezonataj, do, estas, unue, baza rilato je baza dato, kaj mezurilo fidinda por indiki la influon de inflacio sur la guldeno.

La baza rilato estas difinita tiel, ke la aĉetpovo de la Stelo, (en Nederlando), restas ĉiam la sama kiel tiu, kiun havis duona guldeno dum januaro, 1977. Alivorte, la guldeno egalas je la baza dato al du Steloj. En tiu monato, januaro de 1977, la prezindico por konsumajtoj en Nederlando estis 112.3 laŭ oficiala statistiko de la registara buroo por statistikoj. Tiu instanco regule publikigas novan prezindicon, kaj per tiu serio da ciferoj oni povas mezuri la falon en la aĉetpovo de la guldeno.

Tute egale, ni povas uzi tiujn ciferojn por kalkuli novan rilaton inter la Stelo kaj la guldeno, ĉar, laŭdifine, la Stelo estas stabilvalora. La prezindico por decembro 1980, ekzemple, estas 138.2 kaj per tiu cifero ni kalkulas, ke unu guldeno nun egalas al (maksimume) 1.635 Steloj.

Ĉu tiu stabilvalora Stelo havas praktikan valoron kiel kalkulon? Por doni eblecon al la legantoj juĝi mem la respondon al tiu demando, ni citas du ekzemplojn.

Imagu, ke iu eldonisto de monata revuo en Nederlando fiksis, dum decembro 1976, sian abonkotizon por la jaro 1977 je 60,00 guldenoj. Laŭ la guldena kurzo por la Stelo, tiu abonkotizo egalas al 120,00 Steloj. Se tiu eldonisto bone faris siajn kalkulojn, ni povas konstati, ke poa enspezo de 60 gld. plene kovrus la kostojn de la revuo por la tuta jaro 1977. Logike, do, poa enspezo de la ekvivalento de 120 Steloj kovrus la kostojn por iu ajn tuta jaro, ĉar la aĉetpovo de la Stelo restas konstanta. Kiam, do, en la finaj semajnoj de 1980, tiu eldonisto volis fari kalkulon por la abonkotizo por la jaro 1981, la plej simpla maniero estus dividi 120 Stelojn per la aktuala kurzo, (ni diru, 1.635 Steloj por ĉiu guldeno), kaj veni al la cifero de 73,395 gld. La eldonisto devus tiam decidi, ĉu anonci prezon de 72 gld., de 73 gld. aŭ 74 gld., sed almenaŭ ŝi/li havus fidon, ke je iu el tiuj prezoj la risko de bankroto estas forpuŝita!

Ni prenu alian ekzemplon el Francio. Imagu, ke iu laboristo ĝuis, en januaro 1977, monatan enspezon de 2550 frankoj. Tiam la franka kurzo por la Stelo estis :

10 frankoj egalas al 9.875 Steloj. Do la monata enspezo egalas al 2518,25 Steloj, (ni diru, al 2520 Steloj). En la lastaj semajnoj de 1980, la franka kurzo estis : 10 frankoj egalas al 6.735 Steloj, kaj do sekvas, ke por ĝui la saman aĉetpovon, tiu laboristo devas ricevi dum la frua parto de 1981, monatan enspezon en la sumo de 3740 frankoj. Se tiu laboristo estas funkciulo de sindikato, ŝi/li povus montri klare al la dunganto, dum diskuto pri salajraltiĝo, la nedisputeblan fakton, ke, sen ia plibonigo de vivkondiĉoj, la nivelo de la salajro, esprimita en frankoj, devas esti tiu, kiun ni ĵus kalkulis.

Aliaj ekzemploj estas facile elpenseblaj por diversaj valutoj. Grava sekvo de uzado de la Stelo dum kalkuloj de prezoj, salajroj, pensioj, ŝuldoj, havaĵvaloroj kaj tiel plu, estus la grada mildigo de inflacio kun samtempa gardo de vivkondiĉoj ĝenerale. Estas tre konsilinde, ke almenaŭ ni Esperantistoj esploru la eblecojn uzi la Stelon por niaj propraj bezonoj.

IM
Rotterdam,
1981-03-12

Rebato al B.G.D. : Viaj citaĵoj el la evangelioj (Laŭte 34, P.8) ne kontraŭdiras mian aserton, ke Jesuo predikis neperforton, se oni bone komprenas, ke neperforto ne estas rifuzo batali, sed maniero batali. Post la vizito de Lanza del Vasto, la kamparanoj de Larzako elektis la neperfortan defendteknikon, ĉar ĝi sola estis akordigebla kun ilia kristana kredo. Jam de pluraj jaroj daŭras tiu milito inter la larzakanoj kaj la franca ŝtato.

Mi ne konas la rilatojn inter Barbusse kaj la Biblio. En la Malnova Testamento, fajro simbolas la ĉeeston de Dio, ekzemple, Dio aperas al Moseo en fajro. En la rakonto pri pentekosto, fajro estas simbolo de la sankta spirito, kiu ardas en la animoj de la disĉiploj.

Jacqueline.

Tiu ĉi-supra "reago" devus troviĝi sub la titolo "Ĉies tribunon" (p.10/12). La enpaĝigo ne ebligis tion. Kompatu la tajpanton, li faras kion li povas....

La 28an de Marto 1981 en la GOLFECH-regiono

Estis la 2a datreveno de la akcidento en la atomcentralo de Harrisburg kaj okazo rememorigi en tiu ĉi bola periodo promesplena kiel printempo la firman sintenon de la kontraŭnukleaj civitanoj.

Pro tio, la ekologia komitato de Midi-Pyrénées kun la kunordigo de pluraj antinukleaj komitatoj regionaj organizis ŝajnon de "ORSEC-RAD"-plano : malhelpi trafikon sur la ĉefaj vojoj per baraĵoj, informi la aŭtomobilantojn, kunveni en la halo "J. Baylet" en Valence d'Agen, ĉefa centra posteno de la manifestaciantoj kun informejo kaj libroservo.

Ekde la oka matene, el ĉiuj direktoj de la regiono, alvenis manifestaciantoj, kiuj jam animis la urbeton. Sed la baraĵoj ekaperis je la 13a en Moissac, Lafox, Malause, eĉ unufoje sur la fervojo. Estis moveblaj baraĵoj por eskapi kiel eble plej rapide al la C.R.S., kiuj alvenis surloken 4, 5-oble pli multenombraj, ol la proksimume 500 manifestaciantoj. Plie, militista helikoptero konstante helpis la policistojn en iliaj manovroj. Perfortaj alfrontoj ne estis eviteblaj, des pli ke la oficialaj reprezentantoj de politikaj kaj sindikataj partioj, la responsuloj strange ne ĉeestis... Ĉefe junaj "neresponsuloj" fronte al la fortoj de la Ordo, kiuj ne hezitis ataki, ĵeti grenadojn larmigajn, kaj frakasi kelkajn aŭtomobilojn... (bedaŭrinde nun klasikaj scenoj pri kiuj la plimulto silentas). Post ŝvebadoj de la gasoj kaj de la mensoj, post la viglaj intervenoj, kuraĝe novaj agadoj estis organizitaj. Kun sukceso dum pli ol unu horo ĝis la 19h30 dekoj da aŭtomobiloj karavane, en ambaŭ direktoj veturis kiel eble plej malrapide sur la ĉefa vojo, malhelpante la trafikon. Vespere okazis koncerto en la halo kaj la morgaŭon renkontiĝo en la Rotondo, mirinda terokojno de la GFA antinuklea en la situo de Golfech terure pretigita. Bilanco : 18 personoj arestitaj, kontuzitaj manifestaciantoj, frakasitaj aŭtomobiloj (fare de la policistoj), 2 policistoj en hospitalo... Sed la vera, la plej grava

bilanco estas alie, en la instigo al solidareco, decido, agemo de ĉiuj kiuj ne volas malesperi, malkuraĝi al antinuklea societo, kiuj ne atendas ke aliuloj agu por ili.

Roza - Ginette - Nicole

Utilaj adresoj : C.A.N. Golfech, 33 rue Guilhem,
 F 82400 VALENCE D AGEN

Por pliaj informoj "le Gèranium enrichi", jarabono : 40 FF al la sama adreso.

Maljunulo rakontas : Pri survoja akcidento, okazinta en
 ***** nia vilaĝeto, mi, kiel plenkreskulo, devis iun tagon atesti antaŭ urba tribunalo.

Ĉar mi ne sciis la momenton, eĉ proksimuman, de mia atestado, mi sidiĝis en la ĉambrego por vidi kaj aŭskultion, kio estas la justico, laŭ tio kion oni fierege asertas al ni.

En tiu okazo mi ĉeestis kelkajn procesojn, el kiuj mi memoras jenan, kun juĝisto, kiu ne estis "senkolora" laŭ sia morala devigo kaj promeso.

Iu komercisto venis de malproksimo kaj perdis sian tempon por klarigi diversajn eventojn, kiujn li vidis.

Sed li ne ĝuis la simpation de la juĝisto, kiu alvokis lin. "...Kaj vi Buĉisto... kial ? Kaj vi Buĉisto, kiam ?..." En unu momento la juĝisto laŭte kriegis "Kiu vi efektive estas, jen vi estas komercisto, jen instruisto, jen bibliotekisto, jen buĉisto !?..."

"Mi - respondis la priskoldita atestanto - kiam mi estas vespere en la biblioteko mi estas "Sinjoro Bibliotekisto" ; okaze mi anstataŭas en lernejo, tie mi estas "Sinjoro Instruisto" ; en mia butikoj mi estas "Sinjoro Komercisto" ; kaj antaŭ bovo aŭ bovego mi estas la Buĉisto..."

-nn-

Kvankam multo - se ne ĉio - iel rilatas kun ekologio, la ĉi-supra "rakonto" ne apartenas al nia nova rubriko "LaŭtEkologio". La engaĝigo...kompatu...povas... (vidu malsupre de p. 19 la rekantaĵon). Red.

JUS APERIS

E. Armand : "Nia Individuismo, ĝiaj depostuloj kaj tezoj per demandoj kaj respondoj", trad. D.C. (Broŝurservo de SAT, 1981, 28 paĝoj, 4 FF).

Kamarado J.G., iama leganto de "L'Unique" (La Unikulo), la gazeto de la liberecana individuisto E. Armand, havigis al la broŝurservo fotokopion de tiu origine franclingva teksto, kiun lerte esperantigis D.C. de la Liberecana Frakcio de SAT.

Armand (vera nomo : JUIN) estas vere grava kaj fakte unika figuro de la franca anarkiismo. Li naskiĝis en Parizo, 1872. Laŭke edukita infano, li estis poste influita de la Biblio kaj de anarkistaj ideoj. Li eĉ kreis tolstoj-anarkistan gazeton "L'Ere Nouvelle" (Nova Erao) en 1901, antaŭ ol fariĝi individuista-anarkista kaj redakti la gazeton "La Anarkio".

Liaj konceptoj, kiujn li opinias ligitaj ne pli al la Stirner-a, ol al la Bakunin-a skolo, ege ŝokis siatempe, kiam li publikigis ilin. Nun, ili aspektas tute modernaj, tute aktualaj, kaj certe multaj nun junaj liberamantoj kaj "marginuloj" estus surprizitaj, malkovrante, ke Armand jam antaŭ 50 jaroj deklaris sin adepto de i.a. neperforto, de "amora kamaradeco", laŭafinecaj grupoj, individua posedo de la produktorimedoj.

La ĵus eldonita teksto, facile legebla, estas trafa kaj aparte konciza prezento de liaj ideoj. Ĝi estas des pli bonvena, ke eĉ en la franca lingvo liaj verkoj fariĝis malfacile troveblaj, ĉar ne reeldonitaj - kaj verŝajne nereeldonotaj. Kribo.

Iel responde al la interesiĝo de multaj legantoj de "Inter Sovetaj Popoloj" (vd. la recenzon en "Laŭte!" n-ro 34, p.16) pri la personeco de la aŭtoro, k-dino Nada Diksztejn-Kömiveŝ, lia vidvino, verkis etan biografion, kiun oni povas legi ĉi-poste.

Tri monatojn post la publikigo, restas apenaŭ cent ekzempleroj el tiu verko, kies duan eldonon la broŝurservo eble povos projekti post kelka tempo.

PETER DIKSZTEJN, la skribinto de 2-voluma libro "Inter Sovetaj Popoloj", naskiĝis en malriĉa laborista familio en Varsovio.

Jam kiel 5-jara knabo li akceptadis ĉiujn laborojn (laŭ siaj fizikaj fortoj), nur ke ankaŭ li kontribuu al la enspezoj de la familio, kies ekonomia stato estis ege malbona.

Regulan vizitadon de la lernejoj li ne povis okazigi, ĉar pro tiutempa politika situacio en Pollando, la instruado estis ofte ĉesigita kaj lernejoj fermitaj.

Peter multe interesiĝis pri sociaj problemoj, lin ege interesis diversaj ideologioj, historio pri laboristaj movadoj kaj elstaraj politikaj personoj. Kiel 14-jara knabo li estis unuan fojon arestita pro politika kontraŭ-registara agado.

Li multe legis, studadis ; pli grandan parton de sia vivo li pasigis en malliberejoj kiel politika "krimulo".

Post la reveno al Pollando en la jaro 1946, dum 2 jaroj li ofte ŝanĝis laborlokojn, pro politikaj kaŭzoj. En la jaro 1948, kiam li laboris en la urbo Wroclav, vizitis lin (feliĉe Peter ne estis hejme) nekonata homo, kiu prezentis sin al la dommastrino kiel bona amiko de Peter. Li multe demandis kaj rakontis pri Peter. Interalie li diris, ke li laboris kun Peter en sama fabriko kaj menciis la nomon de la entrepreno. Post kelkhora atendado li foriris. Kiam la dommastrino ĉion rakontis al Peter, li tuj prenis siajn aĵojn kaj foriris. Li tute ne laboris en la menciita entrepreno, do li tuj komprenis KIU estis tiu "amiko".

Li sukcesis kontakti iun mariston kiu (por bona pago) ebligis al li fuĝi per ŝipo, en karbdeponejo, al Svedio.

...

Dum sia tuta vivo (li mortis en oktobro 1979), post la veno al Svedio, ĈIUNOKTE KAJ ĈIUTAGE kiam li ekdormis, li tuj kriis, veis, defendadis sin de batoj... tiel profundajn rememorojn postlasis en lia psiko la 7-jara restado en Sovetunio. Nada Diksztejn-Kömiveŝ

Tra la mondo per biciklo kaj esperanto

La 23an de junio 1930 mi ekiras de Ĥarmino.

Mardon 1an de julio, mi troviĝas ĉiam en la alta montaro sed iom post iom proksimiĝas al la landlimo. Vespere, mi haltas ĉe la stacio SILENKE. Tie estas nenio por manĝi. Feliĉe, ekzorgas pri mi ruso, "blanka" eksfociero. Li vivas nur per ĉasado. Li sopiras al la pasinteco. Por la vespermanĝo : cervo femuraĵo ! Unuafoje mi manĝas tion, nu! tio estas bongusta !

Rivero Popereĉka. Hieraŭ, post varma kaj laciga tago mi atingis la limstacion Pograniĉnaja Ĉirkaŭ la 13a, ĉe la montosupro. Ankaŭ tie atendis mian alvenon homamaso kaj en ĝi la urbestro. Ĉi-lasto tre afable akceptis min. Invitis min por tagmanĝi la loka komandanto kaj la urbestro, kiuj antaŭ sia foriro donacis al mi dek rublojn. La manĝon, ĉe la bufedo, akompanis bordoza vino. La poliestro, kiu flue parolas la francan, estas ĉino lerninta en Francio.

Antaŭ tie mi trovas esperantiston, kiu helpas en mia preparado. Venas al mi ankaŭ sinjorino, kiu parolas al mi en la franca. Kiu povus kredi, ke sur tiu ĉina mondopinto estas tiom da francparolantoj ?

Je la 18a mi fakte preteriras la limfoston kaj retrovas la sovetan ekstremorientan provincon meze de la montaro, kie ankoraŭ videblas neĝokovritaj pintomontoj.

Noto de 1966 : Kvankam ilin mi ne tiam notis, mi aldonas kvar aventurojn, kiuj okazis al mi en Manĉurio.

I. Mi biciklis en ebenaĵo, puŝate de vento sur la rekta unutraka fervojo. Ruĝa flago signalis min malantaŭe. Subite, akrasona fajfado turnigis al mi la kapon : la lokomotivo de pasaĝertrajno ĵus haltis je 4-5 metroj malantaŭ mi. Kiel rataro en muskaptilo, la surprizitaj vojaĝantoj elvagniĝis por ekscii pri la kialo de tiu abrupta halto. Kiam ili vidis min ankoraŭ rajdantan mian aparaton, en pantaloneto, sunbrunigitan kaj ridegantan, mi ricevis eksterordinaran hurao kaj en momento dis-

vendiĝis miaj kartoj kiel bulkoj.

II. Tio okazis flanke de monto. Mi penadis, grimpante la vojzigzagojn kaj tial mi povis vidi nur je dudeko da metroj. Mi biciklis orienten sur la dekstra trako. Subita tondrego, kaj aperas la impona maso de vartrajna lokomotivo. Ĉe la fenestrorando la maŝinisto en teruro kaj konsternego levas la brakojn. Mi havis nur du-tri sekundojn por reagi. Rapide farite. Mi surgrundiĝas kaj, kiel toreadoro fintanta antaŭ virbovo, mi eligis mian aparaton - biciklon kaj pakaĵojn - el la relo, ĝuste kiam la pezega lokomotiva maso, kun ĉiuj radoj blokita, glitis je 30 aŭ 40 kilometroj hore sur la reloj, de kiuj mi ĵus fuĝis, kaj ĉio en garbo de fajreroj kaj vaporo. Kiam mi alvenis al la stacio, de kiu ekiris la trajno, estas senutile diri, ke mi rajtis belegan skoldadon fare de la staciestro... kaj same belegan ovacion fare de la ĉeestantaj fervojistoj, ĉar tiun incidenton oni telefone rakontis al ili.

III. Elirante el longa tunelo, en grandioza montara cirko, mi haltis por iom ripozi kaj spekti la pejzaĝon. Sur la tunela muro estis granda tabulo el blanka marmoro kun jena surskribo en la franca : "La transsiberian fervojon konstruis francaj inĝenieroj. Al ili ni omaĝas." Sekvas la nomoj de la caro Nikolao kaj de la ĉefaj francaj kaj rusaj eminentuloj de tiu epoko, kaj ankaŭ de la francaj kaj rusaj inĝenieroj partoprenintaj en la konstruado de tiu grandioza artverko. Mi devis raporti tiun omaĝon kaj memori, ke la Transsiberian konstruis grandparte dank'al fama monprunto subskribita de francaj ŝparantoj - prunto, kiun oni ankoraŭ ne repaĝis al Francio pro la Revolucio, kaj kiu estis longtempe kontesto-temo inter Francio kaj Sovetio. Kiu leganto memoras tion ? Kiu en Francio ankoraŭ posedas valorpaperojn pri la rusa monprunto ?

IV. Antaŭ ol forlasi Ĥarminon, mi estis invitita de Pastro DACIER, gaskono, reprezentanta la katolikajn misiojn en Manĉurio. Kompreneble, ankaŭ li interesiĝis pri Sovetio. Ni tuj interamikiĝis, ĉar ni ambaŭ estis gaskonoj. Ni havis la saman "akcenton". Krome, sub klara, simpla, afabla parolmaniero, li kaŝis viglan erudicion kaj tolereman inteligenton. Mi dankas al li plej seriozajn informojn pri mia projekto de vojaĝo al Ĉinio kaj eĉ al Japanio, ankaŭ serio-

zan, geografian, etnan, filozofian dokumentaron konkretan, objektivan kaj realan. Krome mi dankas al li, ke poste mi estis ĉie en Ĉinio respekteme kaj serioze akceptita de ĉiuj katolikaj misioj, kiujn mi renkontis. Efektive, la misioj havis modelan organizon kaj larĝan akceptemon, male al ĉiuj insidaj klaĉoj, kiujn oni povis diri pri ili. Dankon do al Pastro DACIER.

* *
* *

Forlasinte la landlimon, mi ekmalsupreniris la mont-arajn sinuojn. Survoje renkontpasis min kirasita mitral-aŭtotrajno, kun abundo da kanonoj kaj maŝinpafiloj, nura atesto pri la armea sovetia viglatento. Tiel, post 25-30-kilometra biciklado mi atingis la unuan sovetian stacion, KHABATOVA, je ĉ. la 22a, t.e. en plena nokta malhelo.

(daŭrigota)

Alfa-Beta

Al franclingvanoj J.G. konsilas :

Rilate al la ĉenletero "Ĉu mita laborista revolucio? Ĉu konstruado de alternativa socio?" mi konsilas al tiuj, kiuj scipovas la francan lingvon kaj deziras plej gravajn informojn, legi la ĵus aperintan numeron de la revuo "Autrement" : "Kalifornio" (pri la diversaj spertoj en tiu regiono de Usono. ("Autrement"; 73 rue Turbigo, F 75003 PARIS) kaj la numeron 2-3 de la revuo "Autogestions", kiu bone raportas pri la alternativaj efektivigaĵoj en Germanio. Por tiuj, kiuj scipovas la germanan lingvon, ekzistas abunda bibliografio.

"Autogestions", 54 bd. Raspail, F 75006 PARIS

Eldonejo Privat, 14 rue des Arts, F 31000 TOULOUSE.

J.G.

La venonta "Laŭte!" + la "Adresaro 1981" aperos komence de julio.

En ĝi troviĝos la eventualaj informoj pri la ĉi-someraj E-renkontiĝoj.

Restas pluraj semajnoj : bonvolu kiel eble plej frue sendi la modifojn al la "Adresaro". Dankon!

SAT-BROŝURSERVO

Ĝisdatigita broŝurlisto troviĝos en la baldaŭ aperonta "Adresaro de Laŭte - 1981".

- * "Lingvaj Anguloj" de F. Baronnet estas ĵus reeldonita. Ĝin ni senhezite rekomendas !
- * Ĵus aperis "Nia Individuismo" de E. Armand. Vd. p.22.
- * Por la jaro 1981 eblas do aboni la jam aperintajn tekstojn :
 - . El Verkoj de Tolstoj . Inter Sovetaj Popoloj .
 - . Naciismo kaj Esperantismo . Nia Individuismo .
 Sume: 35FF. Abonprezo kun 20%da rabato k. afranko: 28FF.
- * Estas projektita la reeldonado de "El Verkoj de Lanti", kies enhavo estos iom modifita : El ĝi malaperos la ekstraktoj el "Vortoj" (nun disponeblaj en kompleta volumo), sed "Adamaĵoj", kiu antaŭe aperis aparte, estonte apartenos al tiu broŝuro "VL.1".
- * Por la venonta jaro la broŝurservo havas jam almenaŭ du projektojn :
 - broŝuron kun titolo "El Verkoj de Lanti - 2" enhavantan plurajn ankoraŭ ne eldonitajn tekstojn de Lanti, i.a. "Tri Semajnoj en Rusio - 1922", "Tro Plena Gramatiko..." kaj aliajn.
 - "Migrante tra Metioj", la kvaran aŭtobiografian broŝuron de nia amiko VALO.

Eksterabone aperos post du monatoj por franclingvanoj alia broŝuro de K-do Lentaigne : "Abrégé pratique de Grammaire Espéranto". Informojn pri ĝi vi trovos en la julia "Laŭte!".

Kribo.

*
* Directeur & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut
*
* Commission paritaire de presse n° 58651
*
*

E-VIVO

Regiona Renkontiĝo en

S O U I L L A C (46)

la 17an de majo 1981.

Kunvenejo : Salle municipale, avenue de Sarlat (Alvenante de CAHORS, maldekstren ĉe la unua trafiklumo).

Dimanĉon matene - je la 9a : malfermo de la kunvenejo.

akceptado - interkonatiĝo - libroservo - ekspozicio
ekzamen-sesio.

je la 11a : Vizito de la urbo

12a/14a : Piknika tagmanĝo ĉe la Dordonja riverbordo.

(Se pluvos - fantazia supozo! - manĝo en la kunvenejo).

Ne forgesu kunporti viajn tagmanĝon kaj bonhumoron !

Posttagmeze : 14a30/17a. Piedira promenado de la valo al
monteto Pipu laŭ vojetoj kaj padoj kaj reveno al la urbo.
Se malbela vetero : vizito al grotoj de LACAVE (prezo:9FF)

Eblos tranokti en Souillac por tiuj partoprenontoj, kiuj
preferos alveni sabaton. Sin anonci sufiĉe frue por even-
tuala rezervado de ĉambro. Eblas ankaŭ
tendumi. Partoprenontoj sin anoncu kiel
eble plej rapide, precipe tiuj, kiuj
intencas trapasi ekzamenon.


Utila adreso : P. SIGNORET

Rue de Timbergues

46200 SOUILLAC

Tel:(65)37 85 21.

Ĝis baldaŭ !



Ĉe la mediteranea marbordo :

Venu, vidu kaj feriu !

Feriu tutan semajnon en agrabla urbeto ĉe l'mediteranea marbordo ; samtempe, perfektigu vian scipovon de Esp-o, kaj partoprenu ĉiujn ajn kulturajn aferojn, ekskursojn tra nia regiono...

En la Familia Centro de Lazaret (Sète), kie la Kultura Esperanto-Centro organizas la aferon, la internacia kaj amikeca etoso donos al vi okazon konatiĝi kun alilandaj samideanoj...

Restado de la 15a ĝis la 20a de Septembro

- Aliĝo kaj kursoj : 45 FF.
- Laŭ peto, ebleco ricevi loĝadon kaj la 3 manĝojn :
 - . en 1-persona ĉambro : 580 FF.
 - . en 2-persona ĉambro : 455 FF.
- Por la aliĝoj alvenontaj post la 15a de majo : aldonu 30FF
- Limdato de antaŭmendo de dormĉambro : la 1an de julio.
- Nombro da litoj : 40.
- Mendo de loĝado valoras post pago de 50 FF.
- Poŝtkonto : Groupe Espérantiste n°1487.48 D Montpellier
- Por ĉiuj informoj : ESPERANTO, 5 rue du Dr. Roux
F 34000 MONTPELLIER (Francio)

Ĝis la plezuro konatiĝi kun vi!!!

Provkursoj de Esperanto en franca kolegio :

S-ro René Llech-Walter faris la 22an kaj 23an de marto 1981 du provkursojn de E dum oficialaj horoj en la Kolegio Albert Camus en Perpignan.

Ĉiuj lernantoj ricevis la broŝuron de U.F.E. "Approche de l'Espéranto" kun gramatikaj elementoj.

Esperanto-restado en Beauville (Moulin de Carguessac) laŭ la kutima formulo (programo starigita de la ĉeestantaro mem, komunaj manĝoj kolektive preparitaj, ebleco tendumi, aŭ tranokti ŝirmite en la muelejo, ktp) okazos de la 9a de aŭgusto ĝis la 21a de aŭgusto. Rilati kun C.Baudé, F 47340 Laroque Timbaut, por pliaj informoj.

En G O T E N B U R G O ...

En Gotenburgo, inter kvartaloj, kiujn minacas detruo, kolektiĝas neregule de kelkaj jaroj malfirma internacia amikaro en malgranda eksbierejo "SLINTAS". Ĉi tie troviĝas libraro plejparte liberecana kaj gazetoj el tutmondo. Filmojn oni montras de tempo al tempo. De la lasta jaro kunvenas grupo por interhelpe lerni Esperanton. Se vi iros Gotenburgen, vizitu nin por amuzi. Kompreneble vi povos tranokti ĉe ni.

Skribu al SLINTAS, Kaptensgatan 15, S - 414 63 Gotenburgo Svedio. Tel: (031) 11 79 08 (Kenet)

"Slintanto"

Por franclingvanoj speciale...

Oni ofte aŭdas aŭ legas, ke la franca lingvo estas plej preciza kaj plej taŭga por esprimi delikatajn pensnuancojn. Nu, jen estas ekzemplo.

Multaj franclingvanoj konas la dimanĉan televid-elsendon de Amadou kaj Bertho : "C'est pas sérieux". Tiu titolo estas gramatike malĝusta. En bona franca lingvo oni devas diri : "Ce n'est pas sérieux". Estas tamen nuanco inter "ce n'est pas sérieux" (tio ne estas serioza) kaj "c'est pas sérieux" (tio estas ne serioza). Esperanto, sen ia gramatika malĝusteco, facile esprimas tiun nuancon. Ĝi povas eĉ pli akcenti : tio estas malserioza.

Harfendo, diros iuj. Ĝi tamen pruvas, ke esperanto, tiu kruda lingvaĉo, povas en iuj okazoj venke konkuri kun plej rafinita kulturlingvo.

Valo.

"Vers une communication transnationale"

"SAT-Amikaro" ĵus eldonis franclingvan varbroŝureton : "Vers une communication transnationale". Ĝi estas 16-paĝa en oportuna A6-formato. Bele presita, ĝi certe estas la plej trafa kaj oportuna varbilo, kiun oni de nun povas uzi amase en ĉiuj medioj por informi pri nia lingvo, pri la situacio de E en nia epoko, ties karakterizaĵoj kaj

la eblecoj, kiujn ĝi havigas. Fine, unua leciono, kun taskoj, kiujn oni povas sendi por korektigo. Notindas, ke la pezo kaj la formato ebligas facilan enŝovigon en koverton. Mendi ĉe la libroservo de SAT-Amikaro (kdo SCHNEIDER, 38 av. République, F 94320 THIAIS) aŭ ĉe "Cercle espérantiste de l'Agenais". Ĉiu ekzemplero : 0,50 FF (ope : 0,40) + afranko.

Kribo.

73a Franca Kongreso en PERPIGNAN (U.F.E.)

Ekskurso al Barcelono - Programo (resumita)

Foriro : mardon 9/6/81 je la 7a matene, el la Palaco de la Kongresoj, Perpignan.

Alveno en Barcelono ĉ. la 10a. Eniro tra "Placo de la Katalunaj Gloroj".

Halto : 10 minutoj ĉe la preĝejo de la "Sankta Familio".

Tra la urbo : Promenejo "Sankta Johano". Monumento de pastro J. Verdaguer. Placo "Tetuan". Triumfa Arko. Promenejo "Sankta Petro". Monumento "Rafael de Casanova".

La Gotika Kvartalo kaj Katedralo : 30-minuta halto.

Placo Skta Jakobo. Urbodomo kaj sidejo de la kataluna regado. Akcepto.

Vojo Lajetana: ĝis la poŝtejo kaj promenejo al monumento "Kristofo Kolombo", apud la haveno.

Suprenirado al Montjuich. Tra la parko al la Internacia Foirejo. Placo de Hispanujo. Avenuo Markizo Duero. De la maro al monto tra "Las Rambles" ĝis placo de Katalunio.

Promenejo De Gracia. Vojkruciĝo de la Placo de la Venko. Placo "De Lesseps".

Monto Tibidado. Admirinda vido super la urbo.

Tagmanĝo: en tipa restoracio "La masia" sur monto Tibidado.

Reveno al Perpignan : je la 20a horo.

Informojn liveris : Centre culturel
espérantiste, 72 av. de Gaulle,
F 66000 Perpignan.

En Francio : kiu prezidentos, ĉu GISCARD (nefavora al E) aŭ MITTERRAND (tre favora) ? Respondo la 10an de majo.